

# LINGVA KRITIKO

STUDOJ KAJ NOTOJ PRI GRAMATIKO, VORTARO KAJ STILO

Gvidanto: Prof. D-ro B. Migliorini, LK., Ak. Cefredaktoro: Stefano La Colla, LK. Redaktoroj: Max Butin, LK.; Teo Jung, LK.; Robert Kreuz, LK.; Ing R. Orengo, LK. Redakcio: ĉe S-ro Stefano La Colla, Via Dandolo 24, Roma (114), Italujo

VOL. I \* N-RO 23

MONATA ALDONO AL HEROLDO DE ESPERANTO

FEBRUARO 1934

## Survoje al Konsilanta Gramatiko.

Redaktanto: Teo Jung.

### Gramatikaj demandoj.

#### 78. Malsimplaj tempoformoj.

Cu ĉi jenaj formoj (malsimplaj tempoformoj) estas permeseblaj? Mi trovis ilin en la romano „Mi en li“ de Vladyka:

1. Kovaĉik fermis la studlibrojn, kiujn li havis dismetitaj antaŭ si sur la tero. (P. 76.)

2. Mi veturis tien, sed oni meis, ke tia paro estus alveninta. (P. 173.) (O.M.)

#### 79. Aĵn.

Bonvole respondu al mi en L. Kr., de kia vorto devenas la vorto „aĵn“! (S.F.)  
(Rim. de red.: Kvankam la demando de nia japana s-ano S.F. ne estas gramatika, ni prezentas ĝin al niaj legantoj por eventuala respondo.)

#### 80. Apozicio.

Legante Heroldon n-ro 43 (748), p. 6, sub la rubriko „De mardo al mardo“, mi trovis la jenan esprimon, kiun mi ne povis kompreni pro al mi dusignifeco: „Generala voĉdonado . . . rezultigis venkon de la faŝista movado, de l' batalantoj por libereco“. Nu, kiu el la du venkis? (J.F. Br.)

#### 81. Fraŭlino.

Mi legis en n-ro 49 de Heroldo (jaro 1933) sur paĝo 2: „ . . . S-ino Morris bonege konas kaj parolas Esperanton, same ankaŭ ŝia fraŭlino, kiu . . .“ Mi ne bone komprenis, en kiu senco la redaktinto uzas ĉi tiun vorton „(ŝia) fraŭlino“; ĉu ĝi signifas: filino, ĉu sekretariino, ĉu akompanistino, ĉu servistino ktp.? Sajnas ke mankas iom da precizeco. (P.B.)

#### 82. Tempindiko.

Ofte oni legas (kelkfoje ankaŭ en Heroldo), ke en estonteco io okazis, ekz.: La mongaŭan tagon okazis ekskurso al la montaro; aŭ (Vladyka: Mi en li, p. 116): Venontan tagon diris la servistino. Tio saĝnas al mi almenaŭ kontraŭlogika. (O.M.)

#### 83. Prepozicio: en aŭ sur?

En iu recenzo mi legis ke estas malkorekte diri „en la strato“. Cu?

(K.P.)

#### 84. Komparacio: ol.

En la decembra numero de L. Kr., p. 3 kol. 1, en alineo pri „leviĝi“, troviĝas la frazo: Pro la sama kaŭzo ol en la antaŭa rimarko, Zamenhof ne estis lasinta „sin“ . . . Laŭ mi, tio ne estas komparativo, sed pozitivo; sekve devus esti „kiel“. Krome kion signifas samkolone, lasta linio: La sekigo de la Fortuno? (R.)

#### 85. Pronomo: ties.

Antaŭ nelonge mi legis en iu artikolo la jenan frazon: Kiam mi eniris en la salonon, tie jam sidis la urbestro kaj ties frato. Cu ne sufiĉas (eble eĉ pli ĝusta estas): la urbestro kaj lia frato? (A.S.)

\*

### Respondoj.

#### 72. Trans aŭ super.

Du anglaj abonant(in)oj malkonsentas pri nia respondo en L. Kr. n-ro 21. Unu de ili diras: „Sajnas al mi preferinde diri „super“ kiam la alteco estas konsiderinda, kaj „trans“ kiam la larĝeco aŭ longeco estas tia.“ Efektive, ekzistas kazoj, kiam ne gravas, ĉu oni uzas „trans“ aŭ „super“, ekz. kiam temas pri alta ponto. Kiam oni diras: „La ponto kondukas super la riveron“, tio logike signifas nur ke ĝi „kondukas alten ĝis iu punkto super la rivero“; sed la racio diras al ni, ke ponto ne finiĝas tie en la aero, sed ke ĝi komplete kondukas „trans“ la riveron (t.e. ĝis la alia bordo de la rivero). Harojn ni ne bezonas fendii en Esperanto, kaj ni ne ĉiam bezonas nepre sekvi la logikon. Sed ni ne rajtas deklari malkorektaj la logikajn formojn, eĉ se ĝis nun oni eble uzis mallpli logikajn. Unu ekzemplo por tio: „Li deflankiĝis de la vojo“. Laŭ nepra logiko tio estas kontraŭsenca. Tamen ni diras tiel pro ĉi tiu kaj kutimo. Sed se iu alia logike diras: „Li flankeniĝis de la vojo“, oni ne povas deklari tion malkorekta. En naciaj lingvoj pli decidus la kutimo ol la logiko, sed en Esperanto la logiko ĉiam devas pravi, eĉ se ĝi kontraŭas antaŭan kutimon.

#### 78. Malsimplaj tempoformoj.

La unua frazo estas korekta, la dua estas erara. „Li havis ilin dismetitajn“ = „li havis ilin kiel dismetitajn“. Tamen stranga formo en Esperanto, ne tute samsenca imitado de la racilingva pluskvamperfekto kunmetita: il avait raconté, she had distributed, wir hatten geschrieben, ktp. — La dua frazo devas teksti: . . . oni neis, ke tia paro alvenis. (Oni diris: Tia paro ne alvenis.)

#### 80. Apozicio.

Temas pri simpla apozicio: en la citita frazo la faŝista movado estas identa kun la batalantoj por libereco. Se temas pri du diversaj organizoj, oni devus forstrekii la komon kaj uzi alian prepozicion ol „de“ (eble „super“).

#### 81. Fraŭlino.

Kiel demando 79, ankaŭ ĉi tiu ne estas gramatika. Cetere, s-ano P.B. estas prava ke en la citita frazo mankas precizeco. Ni supozas ke temas precipe pri „akompanistino“, kiu samtempe eble estas sekretariino.

#### 82. Tempindiko.

S-ano O.M. certe pravas. La cititaj formoj estas kontraŭlogikaj kaj tial ne aplikindaj. Pri la formo „morgaŭ“ oni povus eventuale diskuti, sed „venonta, sekvonta“ prefere ne estu uzataj ĉe -is; oni uzu „sekvinta, sekvanta“ aŭ eĉ „sekvanta“: La sekvintan (sekvanta, sekvanta) tagon okazis ekskurso . . . ; sekvintan (sekvanta, sekvanta) tagon diris la servistino.

#### 83. Prepozicio: en aŭ sur?

Kial oni ne povus diri „en la strato“, almenaŭ se temas pri stratoj kun domoj ambaŭflanke? Kompreneble ankaŭ „sur la strato“ estas korekta. Simile „en la ŝipo“ kaj „sur la ŝipo“ (sed ĉi tie „en“ signifas en la interno de la ŝipo, kaj „sur“ signifas sur ĝia ferdeko). Ni uzu nian lingvon kiel eble plej logike; sed ni ne fendii harojn.

#### 84. Komparacio: ol.

La uzado de „ol“ anstataŭ „kiel“ ĉe la komparacia pozitivo estas simpla eraro tuj evidenta. Sed bonvolu atenti, ke la celo de nia ĉi-jena rubriko ne estas, konstati erarojn. Ni ŝatus ricevi vere interesajn demandojn, ne tuj solveblajn per rigardo en lernolibron por komencantoj. „La sekigo de la Fortuno“ estas simpla preseraro iom fatala. Kompreneble, devas esti „seksigo“. Ankaŭ „la“ estas superflua. Do: „La seksigo de Fortuno“.

#### 85. Pronomo: ties.

Ni konsentas kun vi. Ni konsilas uzi „ties“ nur en kazo de miskomprenblo anstataŭ „lia(j), ŝia(j), ĝia(j)“. Ekzemploj:

Li kaj lia (propra) frato (li kun ŝia frato).

La urbestro kaj lia (propra) frato (la urbestro kun ŝia frato).

Sed:

Kiam li (s-ro M.) eniris en la salonon, tie jam sidis la urbestro kaj ties frato (ĉar „lia frato“) povus rilati ankaŭ al „li“).

Tamen, ne povas esti eraro, diri ankaŭ: li kaj ties (anst. lia) frato, nia fratino kaj ties (anst. ŝia) amikino, — kvankam tiujn formojn oni prefere evitu.

### Ĉiun redakcian materialon por Lingva Kritiko

sendu al s-ro Stefano La Colla, Via Dandolo 24, Roma (114), Italujo; sed la materialo por „Konsilanta Gramatiko“, redaktata de s-ro Jung, estas sendota al lia adreso en Köln.

# Transitiveco aŭ netransitiveco.

Granda malfacilo por la lernanto kaj ankoraŭ ĉiam por la spertulo en Esperanto estas la demando necesa, „ĉu transitiva aŭ netransitiva estas ĉi tiu verbo“ (precipe dum rapida parolo, ĉiam la respondo devas esti tuj). Pri kelkaj verboj, ekzemple „boli“, la afero estas klara, la uzonto povas kvazaŭ senti la naturon de la verbo. Tute alie kun multaj verboj, kaj efektive oni sentas sin kvazaŭ en ĉi tiu sola punkto retirita en la naciajn lingvojn kun iliaj listoj de „post tiaj verboj vi devas, ktp.“

Se la spertulo volas uzi kompare novan vorton, ekz. „dilati“ — nu do la uzo ankoraŭ ne difinitive determinis tiun punkton; laŭ la medicina vortaro ĝi devus esti transitiva, laŭ alia vortaro netransitiva. Se ni volas uzi verban formon de radiko, kiu en niaj vortaroj okaze ne estis citita verforme, kaj kiun ni ne memoras en la literaturo — kion fari?

Efektive la malavantaĝo estas preskaŭ, se ne tute, la plej prema, kiun la esperantisto renkontas post siaj unuaj lernataĝoj. Nenia malfacilo tiel daŭre kontinuas lin mistifiki. Estas ja la sperto de ĉiuj lingvoj, ke tiaj problemoj ĉiam solviĝas fufine, kaj bedaŭrinde kelkfoje haose. Tre saĝe, tial, ni faros, se ni konsideros ĉi tiun aferon en nia Esperanto, antaŭ ol la vivo tute senkompatate por la lingvo ĝin solvos.

Kiam ekestas demando pri tio, kio fariĝos ĉi tiu nuda radiko, malantaŭ ol ĝi ricevos la finiĝon „a“, nia sento de valoroj kaj ordinara prudento preskaŭ sen escepto montras sufiĉe precizan signifon, kaj la kunteksto faras la ceteron. Aŭ ni povas fari la signifon certa kaj preciza per aliaj finiĝoj — se necese. La finiĝo „i“ tamen kreas problemon. „Uzi“ povus signifi „uziĝi“ aŭ „uzi“. „Fumi“ plus „i“ egalas kion? Zamenhof devigis ĝin signifi „fumi“ en la senco de „fumi pipon“. Ĉi tie, tute tra la verboj, la kreanto plejparte devas elekti inter la aktiva kaj pasiva senco. Pri multaj verboj, certe, ĉiuj emas konsenti pro natura sento de io aktiva aŭ pasiva en la vorto — sed tute aliaj en aliaj okazoj. Plue, la naciaj lingvoj treege diferencas tiurilate en la internaciaj verboj, tre ĝena fakto kaŭzanta multajn konfuzojn. Pri bone konataj verboj — ŝanĝo por la memoro; por la rapideco kaj flueco de parolo — treege granda malhelpo; pri la malpli bone konataj verboj — diverseco aŭ malfikso de uzmaniero; pri novaj ekz. teknikaj verboj — kiujn ni nek aŭdis nek legis sed kiujn por precizeco ni devas uzi — dubo pri tio, se ni difinas por ili sencon aktivan aŭ pasivan, ĉu aliaj esperantistoj konsentos. Jen ni havas la kondiĉojn.

Kial do Zamenhof ne sekvis la anglan neŭtralecon de verboj? Mi neniam trovis diraron lian pri tio. Almenaŭ li ne tion faris. Kio do nun okazos? Jam foje sen multo da kritiko certaj funda-

mentaj vortoj aktivaj forlasas la „iĝ“ ĉe netransitiva uzo, ekz. „komencas la kunveno“. Dume, ankoraŭ oni rigardas kiel eraron la uzon de „ruli“ anstataŭ „ruliĝi“, kvankam tia forlaso de la „iĝ“ povus ĉe taŭga kunteksto esti pravigata laŭ la principo de sufiĉo.

Kiam oni legas la historion de la anglaj neŭtralaj verboj, oni eltrovas ke iam tiuj estis tiom meneŭtralaj, kiom „ruli“, „ruliĝi“ ktp. Iom post iom, la finiĝoj, kiuj distingis transitivajn de netransitivajn verbojn, forlasiĝis, ĝis havis lokon la nuna formo. Nu, do, la komenco de tio sama jam ekaperis en Esperanto. Ĉu la konservativeco de la plimulto de esperantistoj povos sukcesi kontraŭstari tiun tendencon potencon? Flejparte ne, mi opinias. Ĉu tio estigos trindan aferon? Multaj esperantistoj timas, kaj multaj aliaj ne bonvolaj al Esperanto jam libere profetis, ke ŝanĝoj tiaj, universalaj en naciaj lingvoj, iom post iom tute aliformigos Esperanton.

Tamen ni ne timu nenecese aŭ troe. En la naciaj lingvoj ĉio iris laŭ blinda kutimo kaj hazardaj trudadoj, rezultis nature haoso. Penoj rektigi unu ajon devigis ŝanĝi duan, tio vice necesigis ŝanĝi trian aferon, ktp. Kontraŭe, Esperanto, estante treege simpla maŝino — ĉiu parto necesa por klare difinita celo kaj senkompare bone pensita aŭ aranĝita ĝuste por tio kaj nenio alia — troviĝas tute ekster ĉia danĝero de fundamentaj aŭ rompaj ŝanĝoj. En la antikvaj hind-eŭropaj lingvoj „m“ kiel kazfiniĝo en la akuzativo tendencis fine ŝanĝi en „n“. Nu do, Esperanto jam komencis kun „n“. Kien iri de tie? La kazfiniĝo en la akuzativo kune kun la verbaj finiĝoj ne riskas iĝi iom post iom forlasitaj en la estonteco, ĝuste ĉar ili ne prezentas komplikecon kaj samtempe estas aktive bezonataj ĉiutempe por klare difinitaj celoj en la uzo de la lingvo. Tiaj aferoj, kiel la tuta fundamenta strukturo de la lingvo, estas tro simplaj por plibonigi aŭ iam ajn devigi ian ajn ŝanĝon eĉ plej laŭgrade. Novaj esprimoj enriĝos sendube, ekestos malapero de la nuna mallauĝo de la uzo de l' infinitivo post ĉia konforma prepozicio (ĉar tia evito ne havas en la lingvo eĉ la plej malgrandan celon aŭ utilon, fakte malutilas).

En tempoj kun universala instruado, presado, uzo de lerno-libroj ĉe lingvoj, internaciaj kongresoj, ktp., nur aferoj kiuj daŭre kaŭzas eĉ al la meza spertulo malfacilojn kaj mallertajn hezitojn, aŭ maldisponablajn aferoj, povas ŝanĝiĝi aŭ malaperi.

Tamen, ni ĝin notu bone — ĝuste al tiaj aferoj, kiuj povas kaŭzi laŭgradajn ŝanĝojn, apartenas la demando pri „transitiveco aŭ netransitiveco“. Bone estas, do, ĝin zorge pripensi.

Kiel povos solvo sendanĝera atingiĝi? Zamenhof permesis la uzon de netransitiva verbo kiel transitiva en

okazo de dubo (per la konvencio de forlasita prepozicio) kaj ankaŭ foje uzis la saman verbon en ambaŭ sencoj, transitiva kaj netransitiva tute sen uzo de „iĝ“, ekz. „bati“ en F. K. p. 215 linio 22; kaj p. 174 linio 22 Akto V, Sc. II, Hamleto. Sed la pasiva uzo ankoraŭ faras ĝenon — kaj fakte la plej multe malhelpas tiurilate la fluan parolon. Estas do tre notinde, ke kvankam li ne mencias tion en la Fundamento, tamen en la Lingvaj Respondoj li donis principon, kiu estas tre bona gvidilo en ĉi tiu afero — sed malfeliĉe ne estas sufiĉe vaste konata de esperantistoj. Li tre klare kaj senkompromise diris, ke el ĉiu verbo, ĉu ĝi estas transitiva aŭ ne (li uzas ĉi tie kiel kutime „postulas post si la akuzativon“ por transitiva), oni povas ĉiam fari pasivan, se nur la senco de ĉi tiu pasivo estos komprenebla. Li mencias, ke la naciaj lingvoj, kiel li diras, „pro menia logika kaŭzo“, malpermesas tian liberecon, sed klare asertas ke estas male en Esperanto. En F. K. p. 320 l. 2 li uzas la vortojn, „la voko via ridata“, kaj kvankam el kelkaj tio eble ŝajnas „poezia libereco“, ĉar la esprimo havas lokon en poemo, tamen en la ĵus menciita Lingva Respondo li, speciale pri parolante ĝuste ĉi tiun aferon, diras ke ie „estas prave uzata la esprimo, la celo estos alvenita“. Ankaŭ alie en siaj skribaĵoj li uzas pasivan de transitiva verbo, ekz. en la F. K. p. 551 l. 8 de malsupre. Eĉ pli frapanta estas la jena. Ne nur D-ro Zamenhof, dum li korektis la stilon de siaj kunlaborantoj, ĉe la F. K. lasis senŝanĝa la pasivan uzon de netransitiva verbo sur p. 258 l. 13, sed la aŭtoro de la koncerna artikolo pruvas per sia uzo de la sama verbo sur p. 260 l. 15, ke li ne havis dubon pri la esenca transitiveco de ĝi. Plue Zamenhof mem sur p. 103 l. 17—18, Akto 3, Sc. 4 de Hamleto uzis la esprimon „— al sento kaj prudento . . . (estas ĝi) . . . venebla“.

Foje mis treĉis la cerbon pri la konsekvenco inter ĉi tio kaj lia difinado de klara transitiva aŭ netransitiva forto al verbo en la aktiva voĉo, mi konkludis la jenon:

La aktivaj finiĝoj ne montras la netransitivan uzon de transitiva verbo sen la aldono de la „iĝ“. Se, male, ni uzas „boli“ por transitiva signifo, la „iĝ“ klare montras la faktan, „boligi“ estas transitiva. Sed, notu ke se ni skribas „bclita akvo“, nun ni ne plu absolute bezonas la „iĝ“, ĉar la „ita“ mem montras, ke ni uzas la verbon en senco tia, ke, se ĝi estus en la aktiva voĉo, ĝi bezonus „iĝ“, tial pro la principo de sufiĉeco ni povas tute prave forlasi ĝin, se ni volas.

Tiu permeso de la uzo de la pasivo ĉe ĉiuj verboj, kie ĝi donus bonan sencon efektive estas la necesa komplemento de la permeso ĉiam uzi la akuzativon en okazo de dubo, kaj de la praktiko montrita en la netransitiva uzo de „bati“. (Tamen mi ne memoras, ke iu ajn esperantisto jam rimarkigis pri tio.)

Tiuj du principoj kaj la montrita libereco en la praktiko tre faciligas nian problemon kaj malpliigas la malutilon en okazo de eraro. En la rapida parolo ni ne plu bezonas heziti por nin demandi, ĉu ĉi tiu verbo devas esti „igata“ aŭ „ata“, ktp.

Cu iom post iom la „ig“ kaj eble eĉ la „ig“ malaperos kiel signoj de ŝanĝo de stato de la verbo, kaj fariĝos nur signoj de kaŭzado, ke io okazas, kaj ŝanĝo de la aktiveca-pasiveca stato de la ago esprimata de la verbo (ekz. dilatigi signifas, ke io kaŭzas ke io alia dilatas ion, ikaj „ŝidiĝo“ kiel nun signifas ŝanĝon de stato de la ago, dum „ŝidi“ signifas daŭradon de la sida stato? Mi kredas, ke tre grandskale tio okazos. Kiel anglalingvano mi povas plene certigi tiujn, kiuj eble timas la rezulton, ke la neŭtraleco de la anglaj verboj ne kaŭzas la plej malgrandan malfacilon aŭ malkomprenon en iu ordinara okazo. Mi jam analizis la kaŭzon por multaj dubaj sencoj (la angla lingvo estas ja plena de tiaj), sed neŭtraleco de la verbo estis ekstreme malofta kaŭzo (fakte la peno

rememorigi transitivecon kaj la malon rezultigus rekte aŭ malrekte multe pli da ili).

Sed, ĉar la finiĝoj en Esperanto ne estas kaj ne estos stonĝintaj, kiel tiuj de naciaj lingvoj, mi kredas, ke la Esperantaj verboj ne perdos komplete, kiel la anglaj, malneŭtralecon. Ofte por speciala nuanco, aŭ por forto, ni volos speciale montri kaj indiki la transitivecon aŭ la malon, de iu verbo. Sed tio estos afero de individua sento — se iu verbo ŝajnas al la uzanto ne havi la internan forton por transporti agon sur ricevitajn, aŭ ne kun sufiĉa grado de viveco, aŭ ke la uzo de „ig“ aŭ „ig“ estas necesaj aŭ avantaĝaj por pli bone direkti la agon kaj klarigi la precizan sencan, tiam tiuj finiĝoj estos libere uzataj, kiel en la aktiva voĉo, tiel ankaŭ en la pasiva. Kontraŭbatali ĉi tiu ŝanĝon eble iom malakcelos ĝin kelktempe, sed en la fino estos vane — la vivo mem kaj la frapanta malfacileco de la numajo, tiel por novico, kiel ankaŭ por malnovico, ĝin neprigos.

John E. Bauman.

## Bibliaj esprimoj en Esperanto.

3)

De Joh. Hartog.

Multaj estas la metaforoj en kombino kun propra nomo el la Biblio. Mi citu kelkajn ekzemplojn. Same kiel rilate al la supre nomitaj esprimoj, mi ĉi-rilate devas diri, ke kompreneble ne ĉiuj esprimoj estas rekonataj de ĉiuj. Kompreneble en unu lingvo aŭ en alia ili ne samproporcie enpenetris.

**Judas-kiso.** — Vidu sub la ĉapitro pri la Proverbaro Esperanta, n-ro 1228.

**Simŝon'a forto.** — Juĝistoj XIIV, XV kaj XVI: Simŝon estis unu el la juĝistoj aŭ regnestroj de Izrael. Laŭ la rakonto en la libro de la Juĝistoj li estis treege forta kaj per tiu forto faris multajn miraklojn. Sen helpiloj li foje disŝiris leonon (Juĝ. XIIV, 6); per makzelo li mortigis mil malamikojn (Juĝ. XV, 15); foje, kiam oni baris al li la vojon, fermante antaŭ li la urbajn pordegojn, „li kaptis lapordojn de la urba pordego kun kaj kun ambaŭ fostoĵoj kaj levis ilin kune kun la rigilo kaj metis sur siajn ŝultrojn, kaj forportis ilin sur la supron de la monto“ (Juĝ. XVI, 3). Fine li estas kaptata per la ruzo de virino, nomata Delila, kaj oni malliberigas lin. Okaza de festo oni venigas lin en la festsalonon (templon) por ke li amuzu la kunvenintojn. Tie oni starigas lin meze inter du kolonoj „kaj Simŝon kaptis la du mezajn kolonojn, sur kiuj staris la domo, ikaj apogis sin al ili, al unu per sia dekstra mano kaj al la dua per sia maldekstra mano. Kaj Simŝon diris: Mortu mia animo kune kun la malamikoj! Kaj li ekpremis forte; kaj falis la domo sur la estron, ikaj sur la tutan popolon, kiu estis en ĝi“ (Juĝ. XVI, 29 kaj 30).

**Tiu virino estas Delila.** — Tre ruza virino; vd. supran paragrafon.

**Kain'a ofero.** — Genezo IV, 3—6: Kain kaj Habel, du fratoj, ambaŭ alportis oferojn. Ili volas bruligi sian oferon, sed Dio ne atentis la oferon de Kain.

Ofero, kiun oni neglektas.

**Kain'a signo.** — Genezo IV, 6—16: Post la okazintaĵo de la antaŭa paragrafo, Kain mortigas pro jaŭzo sian fraton. Nun Dio aperas al li kaj demandas lin, kial li faris tion. Kain klopodas eviti Dion, sed Tiu punas lin: „vaganto kaj forkuranto vi estos sur la tero“ (verso 12). Kain ektimas, ke alia mortigos lin. Sed por malhelpi tion, Diu diras al li: „Sciu, ke al iu, kiu mortigos Kainon, estos venĝite sepoble. Kaj la Eternulo lin iu, kiu lin renkontos“ (verso 15).

Havi Kain'an signon nun signifas, ke la portanto havas sur si signon, el kiu evidentiĝas la malnobleco de lia karaktero.

**Ido de Nabot.** — I. Reĝoj XXI, 1—15: Nabot posedis vinberĝardenon, proksiman al tiu de la reĝo. Ĉi lasta, dezirante pligrandigi la sian, sendis al Nabot, ke li vendu ĝin. Malgraŭ pluraj klopodoj, Nabot restis obstina kun la sekvo, ke per ruzo li estaŝ mortigita.

Ido de Nabot komprenebla nun estas obstimulo.

**Urija'a letero.** — II, Samuel XI, 2—13: Reĝo David foje ekdeziris edzinigitan virinon, kies edzo „Urija“ restadis en la armeo, do ne estis hejme. Sed por ke li, kiel reĝo, ne skandaligiu, li venigis la edzon al si kaj transdonis al li leteron por la armeestro, en kiu la reĝo skribis: „Metu Urijan en la fronton de la plej forta batalo, kaj deturnigu de li, ke li estu frapita kaj mortu“ (verso 15). Tio okazis.

Transdoni al iu Urija'an leteron, nun kompreneble signifas, igi iun raportu sian propran pereon.

Estas ankoraŭ multaj aliaj, sed provizore ŝajnas al mi sufiĉe. Ni pririgardu ankoraŭ kelkajn ekzemplojn el la „Proverbaro Esperanta“ de Zamenhof.

Komprenebla la limoj en tiu libreto ĉi-rilate ne estas precizaj. Mi nur oĝas ekzemplojn, kies rilato al biblia teksto estas okulfrapa. Multegal ja estas en ĝi, kies senco estas sama kiel tiu de iu teksto. Ekzemple n-ro 710, „Dio scias bone pri niaj bezonoj“ estas laŭ la senco tute la sama, kiel la diro de S. Mateo: „Via Patro ĉiela scias, ke vi bezonas ĉion tion“ (VI, 32). Tiel same rilate al n-ro 1070: „Vort' en ĝusta momento faras pli ol arĝento“ ikaj al la diro el la Sentencoj: „Vorto dirita en ĝusta tempo estas kiel oraj pomoj sur retajo argenta“ (XXV, 11); ktp.

Estas ĉiam domaĝe, ke ankoraŭ neniu entreprenis venki komentariojn al ĉi tiu, tro malmultaj konata, libreto. Mi supozas, ke por multaj, precipe por ekster-eŭropanoj, multaj proverboj ne estas senpere kompreneblaj. N-ro 763: „Kara estas ovo, kiam venas la Pasko“ nur fariĝas vivanta proverbo, se la uzanto scias, ke en multaj landoj estas kutime manĝi ovojn je la Paskofesto. Tiel same en rilato al aliaj proverboj.

Pri multaj estus interese, se oni povus legi en la komentario, kiu estas la fonto de koncernata proverbo. Ekzemple n-ro 1089: „Mensoganto devas havi bonan memoron“ de la greka aŭtoro Herodoto († 406 antaŭ Kristo).

Supozeble tio estas kelkaj el la kaŭzoj, pro kiuj la Proverbaro ne volas populariĝi. Nuran resumon oni ja ne legas por sia ĝuo!

Al la populariĝo de proverbo multe pli helpas la fakto, ke ĝi estu uzita en ofte legata libro aŭ poemo. Tiel ne estas mirinde, ke la proverbo de Zamenhof: „Eĉ guto malgranda, konstante frapante, traboras la monton granitan“ (el la poemo „La Vojo“, 2-a strofo) jam delonge fariĝis vivanta proverbo. Tamen ĝi estas multe pli longa ol la teksto el la Proverbaro: „Guto malgranda, sed ŝtonon ĝi boras“ (n-ro 238). La duan scias neniu, kvankam la natura inklino ĉiam emas uzi la pli mallongan. Same estas rilate al la du proverboj de n-ro 1047: „Senĉesa guto eĉ ŝtonon traboras“ kaj „De guto post guto distallas granito“, kiu kune ree formas la proverbon el „La Vojo“! Ni nur povas miri pri tio, ke sub n-ro 725 troviĝas laŭlitere la formo el „La Vojo“. Kial Zamenhof ne skribis ĉiulcke tiun esprimon, kiu antaŭvide ja fariĝos multe pli populara? Evidente Zamenhof kopiis ĝin sub n-ro 725 el „La Vojo“. La poemo ja jam aperis en „Lingvo Internacia“ dum 1896 (juni-julia numero) kaj la Proverbaro Esperanta aperis aŭ en 1904 (Petro Stojan, Bibliografio de Lingvo Internacia, n-roj 1563 kaj 4331) aŭ en 1905 (D-ro Joh. Dietterle, Originala Verkaro, I, 8).

Se ĉi tio estas flankeniro, kiu estas interesa por estonta komentiisto, sed ne por ĉi tiu studo.

Ni do transiru al tiuj, kiuj sin bazas sur biblia teksto.

N-ro 4: Komenco de Adamo. — Adamo estis la unua homo laŭ la rakonto de la Biblio (Genezo III, 7). Lia nomo troviĝas en la Biblio ne antaŭe ol en ĉapitro III, 8. Estas atentinde, ke en la Biblio Zamenhof konservis la originalan nom-formon „Adam“ (do ne: Adamo), kio grave efikas al la prononcado. La vorto „Adam“ ne laŭ sia signifo valoras por la klarigo de la proverbo; oni rilatigas la vorton al „tero“ aŭ „ruĝa“ (kombino, kiu ofte okazas: ruĝa tero; kp. „terra-cotta“), sed pli verŝajne ĝi signifas „homo“ (la speco „homo“, kontraŭe al la speco „besto“).

La esprimo signifas: komenci de la ekstrema komenco.

**N-ro 5: Demeti de si la antikvan Adamon.** — Ĉi tiu esprimo, ofte trovata ankaŭ en naciaj lingvoj, ne estas el la Biblio. Ni ja trovas en la Nova Testamento ion similan esprimon: „formeti la malnovan homon“. Tiu intersaĝo de „homo“ kaj „Adamo“ eble povas esti klarigata per mia supra aserto, ke la signifo de la vorto „Adam“ estas „homo“.

S. Paŭlo instruas al la Efesanoj, ke ili ne plu devas iri laŭ la vojo de la naciatoj, sed — li skribas — „vi formetu, rilate al antaŭa konduto, la malnovan homon, pereeman laŭ trompaj deziroj, kaj renovigu rilate al la spirito de via mensio, kaj sumetu la novan homon, kreitan laŭ Dio en justeco kaj vera sankteco“ (Efesanoj IV, 22 kaj 23).

Rompi kun la estinteco kaj komenci novan, pli bonan vivon.

**N-ro 21: Post brua vento subita silento.** — Laŭ la miraklo, farita de Kristo. Kiel priskribas la evangelio de S. Mateo (VIII, 23—28): Kristo velveturis kun siaj disĉiploj, sed subite ekventegis. Kristo mem dormadis, kaj la disĉiploj trege timiĝis. „Kaj ili venis, kaj velkis Lin, dirante: Sinjoro, savu, ni peacas. — Tiam Li leviĝis, kaj admonis la ventojn kaj la maron; kaj fariĝis granda sereno“ (verso 25 kaj 26).

La samon priskribas ankaŭ ni du aliaj evangelistoj: S. Marko IV, 25—fino, S. Luko VIII, 22—26.

Subita ŝanĝiĝo en stato. Ankaŭ: subita forturni (ĝo) de danĝero.

**N-ro 68: Jeti perlojn antaŭ la porkojn.** — Vorto el la granda parolado de Kristo, kio Li diras: „No donu ŝanĝitaĵojn al la hundoj, nek ĵeti viajn perlojn antaŭ la porkoj; por ke ili ne premu ilin sub la piedoj, nek poste, sin turninte, disŝiru vin“ (S. Mateo VIII, 6). La esprimo klarigas sin mem.

**Noto:** Atenitu, ke Zamenhof en sia Proverbaro skribas „porkojn“; la traduka komitato de la Nova Testamento skribis „porkoj“. La unua ŝajnas gramatike pli ĝusta, sed pro la Principo de Sufiĉo oni facile povas forlasi la non.

**N-ro 84: Filo konfesis — patro forĝis.** — Kio kludo de unu el la parabloj de Kristo: S. Luko XV, 11—fino. Viro havis du filojn. Unu el ili forlasis la domon por provi la feliĉon eksterlande. Sian monon li baldaŭ foruzis. Nun li devas labori kaj li devas humile eklabori kiel porkogardisto kaj eĉ manĝi ties manĝon. Nun li ekpentas kaj decidas reiri al la patro. Tiel li faras kaj reveninte li konfesis: „Patro, mi pekis kontraŭ la ĉielo kaj antaŭ vi, kaj jam ne meritas esti nomata via filo“ (verso 21). Nun la patro ekĝojas pro la reveninta perdo kaj li ordonas buĉi grasigitan bovidon kaj fari feston.

Klarigo: „Kiu kaŝas siajn pekajn, tiu ne estos feliĉa; sed kiu ilin konfesis kaj forlasas, tiu estos pardonita“ (Sentencoj XXVIII, 13).

**N-ro 88: Parenco per Adamo.** — Pri Adamo unue komparu la noton sub n-ro 4. Komprenable, ĉar la tuta homaro devenas de Adamo, ĉiuj homoj senescepte estas parencoj inter si per Adamo.

Tre malproksimaj parencoj.  
**Noto:** komparu la esprimon: „Osto el miaj ostoj“.

**N-ro 115: Se Dio ordonas, eĉ ŝton' lakton donos.** — Ĉi tian rakonton ni plurfoje renkontas en la Biblio. En Eliro XVII ni legas, ke Dio ordonas al Moseo, la gvidanto de la hebreoj, frapi rokon kaj „eliros el ĝi akvo,

kaj la popolo trinkos“ (verso 6). La popolo ja troviĝis meze de dezerto kaj ne havis akvon.

Ankaŭ en Nombroj ni legas ion tian: „Kaj Moseo levis sian manon kaj frapis la rokon per sia bastono du fojojn; kaj ekfluus multle da akvo“ (Nombroj XX, 11).

La profeto Nehemja citas ĉi tiun okazaĵon kaj diras: „Kaj panon el la ĉielo Vi donis al ili kontraŭ ilia malsato, kaj akvon el roko Vi elirigis por ili kontraŭ ilia soifo“ (Neh. IX, 15).

Plurloke en la Psalmaro kaj unu fojon ĉe Jesaja la samo estas ripetata. Nenie tamen fakte ekfluas, ĉiam akvo.

La klarigon de ĉi tiu miraklo donas la anĝelo Gabriel, kiam Li diras: „Ĉe Dio nenio estas neebla“ (S. Luko I, 37).

**N-ro 117: Ne atingos krio ĝis la trono de Dio.** — Ion similan ni legas en la Plorkanto de Jeremia: „Mi kovris Vin per nuboj, por ke ne atingu Vin la preĝo“ (Ĉap. LIII, 44).

La proverbo komprenable havas alian sencan kaj nur signifas, ke la homo vane krius al la ĉielo.

**N-ro 220: Neniu scias, kio morgaŭ lin trafos.** — Similan sencan ni vidas en la parablo de Kristo, kiu diras, ke posedanto de granda bieno estis tiel riĉa, ke li eĉ ne povis formeti siajn provizojn. La posedanto nun pensis: „Mi diros al mia animo: Animo, vi havas multajn posedaĵojn, provizitaĵojn por multaj jaroj; ripozu, manĝu, trinku, estu gaja. — Sed Dio diris al li: Ho senprudentulo! ĉi tiun nokton oni postulas de vi vian animon“ (S. Luko XIII, 19 kaj 26).

La esprimo klarigas sin mem.

**N-ro 252: En fremda okulo ni vidas ligneron, en nia ni trabon ne vidas.** — El sentenco de Kristo, kiu Li diras en Sia granda parolado: „Kaj vi rigardas la lignereton en la okulo de via frato, kaj ne pripensas la trabon en via okulo? Kiel vi diros al via frato: Lasu min eliri la lignereton el via okulo; kaj jen la trabo en via propra okulo? Hipokritulo, eligu unue la trabon el via okulo, kaj tiam vi klare vidos, por eliri la lignereton el la okulo de via frato“ (S. Mateo VII, 3, 4 kaj 5, kaj S. Luko VII, 41 kaj 42).

Oni devas unue forigi proprajn erarojn kaj nur tiam oni rajtas kritiki aliajn.

**N-ro 256: Laŭ la frukto oni arbon ekonos.** — Ĉi tiun esprimon ni kelkfoje povas legi en la Nova Testamento. S. Mateo VII, 17: „Per iliaj fruktoj vi konos ilin. Ĉu el dornarboj oni kolektas vinberojn, aŭ el kardoj figojn?“ Kaj ankaŭ en la 20-a versoj de la sama ĉapitro: „Tial per iliaj fruktoj vi konos ilin“, t. s. per la fruktoj de arbo oni ekscios, ĉu ĝi estas bona arbo aŭ malbona.

S. Mateo XIII, 33: „Aŭ faru la arbon bona kaj ĝian frukton bona, aŭ faru la arbon malbona kaj ĝian frukton malbona; ĉar la arbo estas konata per la frukto“.

S. Luko VII, 43 kaj 44: „Ĉar ne ekzistas bona arbo, kiu donas puran frukton; nek pura arbo, kiu donas bonan frukton. Ĉar ĉiu arbo estas konata per sia propra frukto. Ĉar el dornarboj oni ne kolektas figojn, nek el nubusoj oni rikoltas vinberojn“. La klarigo de la esprimo jam selvas en la sekvanta versoj: „Bona homo el la bona trezorejo de sia koro liveras bonon, kaj malbona homo el la malbona trezorejo liveras malbonon“ (verso 45).

**N-ro 354: Kion vi semas, tion vi rikoltos.** — Laŭ admono de S. Paŭlo: „Cion, kion oni semas, tion ankaŭ li rikoltos“ (Galatoj VI, 7).

La signifo estas komprenbla. Kiel oni

agas rilate al aliaj, tiel same la aliaj agos rilate al ni.

**N-ro 610: Dio donis, Dio prenis.** — Tre konata proverbo el la libro Ijob. Ijob, tre riĉa homo, estas provata kaj post kiam Dio forprenis ĉion de li, Ijob leviĝis, disŝiris sian veston, pritondis sian kapon, jetis sin sur la teron, kaj adonkliniĝis; kaj li diris: Nuda mi eliris el la ventro de mia patrino, kaj nuda mi revenos tien; la Eternulo donis, kaj la Eternulo prenis; la nomo de la Eternulo estu benata“ (Ijob I, 20 kaj 21).

Ĉio, kion ni posedas, estas de Dio; ni do ne rajtas plendi, se Dio reprenas Sian posedaĵon.

**N-ro 686: Kiu frapas, al tiu oni malfermas.** — Laŭ parolo de Kristo en Lia granda parolado: „Petu, kaj estos donite al vi; serĉu, kaj vi trovos; frapu, kaj estos malfermita al vi; ĉar ĉiu petanto ricevas, kaj la serĉanto trovas, kaj al la frapanto estos malfermita“ (S. Mateo VIII, 7 kaj 8).

Signifo memkomprenebla.

**N-ro 853: Mi lavas al mi la manojn.** — Bildo en la lastaj tagoj de Kristo. Kiel konate, oni malberigas Kriston, ĉar laŭdire Li incitis la popolon kontraŭ la fariseoj. Nun tiuj fariseoj iras kun Li al la roma estro por peti de li permeson punmortigi Kriston. Pilato, la estro, ne scias, kion fari. Se li malberigos la akuziton, la popolo parolos pri liaj ne tute neproceblaj agoj al la roma imperiestro; se li transdonas Lin al mortigo, li pekas kontraŭ sia konscienco. Nun, por viŝi de siaj manoj la kulpon, li lavas siajn manojn: „Pilato prenis akvon kaj lavis siajn manojn antaŭ la homamaso, dirante: Mi estas senkulpa pri la sango de tiu justulo: vi zongu pri ĝi“ (S. Mateo XXVIII, 24).

Kiel konate ankaŭ dum la Meso la pastro lavas al si la manojn signe de la pureco, kun kiu li devas oferi la hostion, dirante: „Mi lavas miajn manojn per senkulpeco kaj“ (Psalmaro XXVI, 6 aŭ XXV, 6, t. e. sub la latina nomo „Judica me, Domine“ — ne intermiksebla kun Ps. XLIII aŭ XLII, t. e. „Judica me, Deus“ — aŭ sub la nomo de la komencaj vortoj de la 6-a versoj: „Lavabo inter“).

En ambaŭ okazoj komprenable la sama motivo.

**N-ro 977: Multaj vokitoj, sed ne multaj elektitoj.** — Unu el la parabloj de Kristo rakontas pri edziĝa festo. Post la preparado de la festeno, la gastiganto dissendis siajn sklavojn por voki la gastojn. Tuj tamen ne volis veni kaj elpensis ĉiajn antiŝiĉojn. Nun la gastiganto kolektis ĉiuj sendas siajn sklavojn en la stratojn por inviti ĉiujn strathomojn, bonajn kaj malbonajn. Ili venis ĉiuj senescepte. Unu el ili tamen ne havis sur si edziĝofestan veston. La gastiganto lin demandis pri la kialo, sed la gasto restas silentante. Tiam la gastiganto igas lin elfeti, dirante: „Ĉar multaj estas vokitaj, sed malmultaj estas elektitaj“ (S. Mateo XXII, 14).

Sen plia komentario ĉi tio versajne ne estas por ĉiu komprenbla. Kial tiu gastiganto unue igas inviti la homon, kaj poste elfetigas lin el la domo?

La unuaj gastoj, kiuj ne volis veni, estas en la parabolo la judoj kiuj malakceptis la evangelion. Unue al ili sin turnis Kristo. Nun la paganoj ja akceptas ĝin. Tio estas ĉiuj strathomoj, kiuj venas; senescepte ili akceptas la inviton. Tamen el ĉiuj ĉi multaj invititaj, relative nur malmultaj atingos la veran celon; pro tio, ke ili en la vera fido ne dece vivas.

El ĉi tio oni ankaŭ facile povas kompreni la simbolan signifon de la proverbo.

(Finota.)